

## **Esperanto en Eŭropa Unio**

**Antaŭrimarko:** La opinioj de la homoj, kiuj parolas Esperanton, estas simile multspecaj kiel la opinioj de la parolantoj de aliaj lingvoj. La sekva teksto prezentas la opiniojn de tiuj Esperanto-parolantoj, kiuj konsentis pri ĝi. Ĝi ne povas esti ĝenerala pozicio por ĉiuj Esperanto-parolantoj en la Eŭropa Unio; ankaŭ neniu Esperanto-organizaĵo povas paroli por ĉiu Esperanto-parolanto.

### **Kreskanta uzado de Esperanto en EU kaj tutmonde**

Proksimume 100.000 EU-civitanoj parolas Esperanton sufiĉe bone por povi uzi ĝin. La uzado de Esperanto kreskas, eĉ se tio estas nur malmulte konata – en internaciaj renkontiĝoj same kiel en la interreto, en la muziko, en vikipedio, kiel denaska lingvo kaj en la landoj de la Tria Mondo. La ĉina registaro uzas Esperanton por sia informado sur [esperanto.china.org.cn](http://esperanto.china.org.cn).

### **Relative rapide lernebla. Bona regado de la lingvo estas atingebla**

Pro sia reguleco Esperanto estas relative rapide lernebla. Kutime post du aŭ tri semajnfinaĵoj kursoj oni povas partopreni en internaciaj renkontiĝoj kaj plulerni el la praktiko. La bona lernebleco de Esperanto kondukas ankaŭ al tio, ke multaj Esperanto-parolantoj dum la jaroj atingas tre bonan regadon de la lingvo, pli bonan ol en siaj aliaj fremdlingvoj kaj kompareblan kun tiu de sia gepatra lingvo.

### **Rekono kaj dokumentado de Esperanto**

Por adekvata traktado de Esperanto necesas bona informado kiel bazo. Ni sugestas, ke la EU-Komisiono rekonu Esperanton kiel unu el la lingvoj parolataj en EU, menciu ĝin en siaj publikaĵoj kaj dokumentu la lernadon kaj uzadon de Esperanto en EU.

La EU-Komisiono ankaŭ esploru kaj publikigu, kiom el la interpretistoj, tradukistoj kaj aliaj oficistoj de la EU-institucioj parolas Esperanton. Entute supozeble temas pri pluraj dekoj da personoj, el kiuj du konatiĝis kiel Esperanto-aŭtoroj (Jorge Camacho kaj István Ertl). En la nuna EU-parlamento (2009/13) membras almenaŭ du deputitoj, kiuj lernis Esperanton – Margareta Handzlik parolas Esperanton flue kaj regule.

### **Esperanto kiel ponto al aliaj kulturoj**

En internaciaj Esperanto-aranĝoj renkontiĝas civitanoj el la diversaj landoj de EU same kiel el aliaj partoj de la mondo. Per tio ili pli bone konatiĝas kaj spertas la kulturojn de la aliaj. Ofte estiĝas pli profunda intereso kaj oni lernas pliajn lingvojn de EU por ekhavi pli bonan aliron al la aliaj EU-civitanoj kaj ties kulturoj. Esperanto subtenas la kunecon de la eŭropaj civitanoj, kiuj parolas tiun lingvon. Esperanto signifas paŝon al la alia, paŝon por pli proksima konatiĝo de homoj kaj kulturoj.

### **Subtenado de la instruado kaj uzado de Esperanto**

Ni ĝojas, ke intertempe en la EU-programo „Dumviva Lernado“ oni permesis ĉiujn lingvojn, ankaŭ Esperanton. Estus utile esplori la rolon, kiun Esperanto ludas en la alproksimiĝo kaj la interkompreno de la kulturoj de Eŭropo per la esperantlingvaj EU-civitanoj. La Esperanto-instruado, la memstara Esperanto-lernado kaj la uzado de Esperanto estu subtenataj simile kiel ĉe la aliaj EU-lingvoj – ĉe la oficialaj, la duonoficialaj kaj la minoritataj lingvoj.

### **Elektebla fako en lernejoj kaj universitatoj. Esplorado**

La lernado de Esperanto kaj ĝia uzado en la internacia komunumo de la Esperanto-parolantoj subtenas la interkomprenon de tiuj EU-civitanoj. Esperanton oni pli ofte proponu kiel elekteblan fakon en lernejoj kaj universitatoj en EU; la koncernan ofertan en la EU-membroŝtato Hungario ĉiujare uzas pluraj mil lernantoj kaj studentoj. Krome la EU-Komisiono subtenu kaj kunordigu la instruadon de Esperanto kiel elektebla fako kaj la koncernan esploron, konforme kun ĝia tasko subteni kunordigon de la politiko de la EU-ŝtatoj en kampoj kiel kleriĝo, junularo kaj kulturo.

### **Plia uzado de Esperanto en EU-institucioj nur post plia disvastigo**

La listigitaj rimedoj supozeble signifas dum la venontaj jaroj adekvatan kaj sufiĉan rekonon kaj subtenon de Esperanto en la Eŭropa Unio. Plia uzado de Esperanto – ekzemple kiel (interpretata) debata lingvo en la EU-parlamento, kiel pontlingvo ĉe interpretado aŭ kiel aldona oficiala lingvo de la EU – laŭ nia opino provizore ne estu konsiderata. Unue la nombro de Esperanton parolantaj EU-civitanoj kaj la uzado de Esperanto esence kresku. Per tio ankaŭ la faka vortaro de Esperanto por specialaj EU-temoj vastiĝos.

### **Esperanto ne estu la *sola* oficiala lingvo de EU**

Eblan enkondukon de Esperanto kiel *solan* oficialan EU-lingvon laŭ la hodiaŭa vidpunkto ni konsideras neĝusta – sendepende de la demando, ĉu tio iam estus politike atingebla. La EU-civitanoj daŭre povu en kontakto kun EU-institucioj uzi unu el la allasataj EU-lingvoj. La plureco de la lingvoj de EU estas konservenda ankaŭ en la politika kampo.

(Stato: 22-a de marto 2010)